


PENSEO

N-ro 315

jan. / 2018

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 29-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Anteo (Ĉinujo)



prujno

profundan nokton senbruan,
la gustoj diversaj de la pli ol duonvivo
fride solidas sur la kapo jam aŭtuna.
en vana atendado
la koloraj sonĝoj
fariĝas blankaj pulvoroj.
ne estas spleno pli ol ke la koro velkas.
la suno julia
ne povas veki la dormanton kun okuloj
nefermitaj.
persiste restigante la promeson,
mi ekspektas la sekvantan matenruĝon.
solitero
movas la vivon.
planto
ankaŭ havas dezirojn.
for de sensivo
mi gustumas la voĉojn kaj bildojn
memfaritajn.

2009-7-21

akvo

ĝi kontentigas sin per sia sorto.
poto, bovlo, ĉerpilo kaj pelvo –
kie troviĝas kavaĵo, tie estas hejmo.
ĉiam en malalta loko.
eĉ se ĝi glitas de la alteco granda de dek
mil
metroj,
ĝi mem disrompiĝas
sed neniam damaĝas aliajn.
la supleco superas fortecon;
guton post guto ĝia volo ja boras ŝtonon.
ĝi aŭdacas diri neon al avido
kaj renversas montojn kaj riverojn.
ĝi aŭdacas puni malŝparulojn
kaj lasas la fundon de lago elfumi.

kiu diras ke sango pli densas ol akvo?
sen akvo, velkas menso kaj karno.
virino estas akvo.
sen akvo, la emajla vazo de viro fendiĝas
pro sekeco.



2009-7-14

fajro

ĝi fandas oron
ne per martelado.
la pasio glacion vaporigas.
danke al ĝi ĉiuj estaĵoj ricevas varmon;
pro ĝi detruiĝas grandaj domoj.
se ĝi samritme spiras kun vi,
la lumo fulme heligas la finon de la
mondo.
kaj la pluvo en la koro
nigrigas la blankajn harojn.

2009-7-15

vento


ĉu vento
sentiĝas malvarmeta aŭ ege malvarma,
estas ideologio.

gripo sensiva kaj ŝanĝiĝema
iam igas nin aspiri venton
kaj iam timi venton.
fakte,
kiam ajn ni estas febraj.

la venta senformeco
ne kapteblas,
kiel amo,
kiu ne havas pezon,
povas detrui ŝtalajn ostojn
kaj ankaŭ
starigi sakon vakan.

2009-7-16

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Penso

Novembras kaj mi pensas,
ke l'estad' en la mondo
ekziston ne signifas.

La senco de la vivo
estas la viv' de l' senco,
kiu loĝas en ni,
nin subtenas kaj movas.

Juiz de Fora, 15/11/2017.

Tago de l'Negra Konscienco

Imite al Nietzsche, malhumanas,
tro malhumanas, sklaviganta homo
ekde l' prahistoriaj tempoj
de la krudfreneza homaro.

Nin hontigas sklavig', kaj ĝi
Brazilon fratan humiligas.
Ĉu kompensas pardonpeti?

Juiz de Fora, 19/11/2017.

Karnavaligo

Malkvieta palimpsesto
iras mi sur plac' publika .
Sur mia korpo tramarŝas
ebriaj pridubaj vortoj
liberigitaj el vortaro.

Versoj skribatas silente
ĉe l' necerteco de l' horoj;
jen liturgio kristnaska
senkonsidere al bardo:
pergamen' melankolia.

Juiz de Fora, 02/12/2017.

Paulo Silas (Brazilo)



Kristnaska kanto

En poŝ', ektintu sono gajiga.
Ĝojon aĉeti. Donu realojn!
Korus' decembra kantu muzikan…
Manoj tuj tuŝu multajn dolarojn!

…marŝon sur strat' kaj voj' orumitaj.
Kaj ankaŭ eŭrojn! Pesojn! Juanojn!
Havi la rajton vivi! Ĉu panojn!?
Ho, kristalklaraj liroj filistraj,

Vanta korfaciliĝ' en vi bolas;
Ĉar supraĵaj pretendoj vin voras.
Mil valutoj, krom ĝoj', amasiĝos.

Ormoner' ne certigos la benon.
En kristnask', oni nasku komprenon:

Konsumismo neniam sufiĉos.



PREPAROJ

Kaj estiĝis silento ene de l' abismo
Por tuj poste konturojn preni la sismo.
Kvietiĝis la movoj, for de si, kreskantaj
Kaj samcentren ŝveliĝis, baldaŭ
eksplodantaj.
Partieco alian ludon ekdesegnis
Sur senflanka sinteno, kiu degeneris.
Multaj sentoj flugadis super la surfaco
Kun pretendoj atingi randon de la spaco.

Hans-Georg Kaiser (Germanujo)



Pri mi

Mi estas, laŭ mia nomo, Cezar,
sed dubas pri mi mem dum la far'.
Mi naĝis tra merdo, tra malver'.
Mi cerbumis, ŝvebis for de l' ter'.
El kapo mia fluas torent',
ja belo eĉ, sed ankaŭ nur vent'.

Pro embaraso mi verkis pri la mort'
kaj ĉeokaze eĉ kun tuta fort'.
Se maroj saltas brue kun impeto,
mi sentas tuj, ne estas mi profeto!
Poemojn miajn gvidas fantazi'.
Sed certe ofte ankaŭ iluzi'.

Mi tamen estas kun ĝojo herezulo
kaj provokanto dum postulo.
Pro histerio mi kun verv' prikantis,
rindindulinojn, ĉar mi tro vantis.
Mokulo mi estas, jes ja – kaj poet',
fantomribelulo de l' interret'.

Legu ankaŭ poemojn!

Vi rapidas, vi hastas. Vi kuras.
Vi faras tion, kion ĉiuj faras?
Kial vi ne legas poemojn?

Forĵetu vian brakhorloĝon.
La poemoj pacience atendas vin,
kelkaj jam dum longa tempo.

Poemoj estas aliaj momentoj.
Poemoj estas bluaj fenestroj
en grizaj pluvemaj tagoj.

Poemoj estas eĥosondiloj
aŭ savringoj por dronantoj.
Poemoj estas buoj kaj turoj.

Poemoj estas miraklokestoj.
Formetu la poemskalpelon
el viaj lernejaj tagoj.

Poemoj ne estas soldatoj,
Legu ilin foje ankaŭ laŭte.
Flustru ilin, deklamu ilin esplore.

Se vi legas poemojn, faru tiel,
kvazaŭ vi sidus en koncerto
de ĉambromuzikistoj.

Legu do poemojn,
forlasu vian maŭzoleon.
Fajfu pri la tielnomata utileco
kaj legu poemojn!

Legu bonajn poemojn, leganto,
sed ne forgesu dum tio vin mem.
Legu ankaŭ poemojn.



Wally du Temple (Kanado)



Silento horora

Kiam dolorigas miajn orelojn
La akre tranĉiga bruo de tertrema sireno
Kiajn sentojn revenigos
La kia silento post kiaj kolapsoj,
Ĉu dolorigos miajn orelojn
La manko de vivosignoj?
Ĉu plej eta krio
Esperigos miajn orelojn?

Silento oni diras estas ora
Sed post tertremo horora!

Tagnokte

Mi ofte havas samajn ideojn.
Ĉu arboj maltrankviliĝas
Kiam la samaj ventoj trablovas
Iliajn verdajn kapojn
Tagnokte?

Mori (Usono)




AFORISM-e (27)

Vivo
estas batalo
por valora kialo.
***
Sekvu
viajn revojn
ili montras al vi
la vojon.
***
Vivo plenplena
je malĝojo
aŭ plena je ĝojo
kaj rido
dependas de via
decido.
***
La diferenco grandiozas
inter tiuj, kiuj vivas pace
kiel kolomboj
kaj tiuj, kiuj vivas
per pafiloj kaj bomboj
La unuaj estas homoj
la duaj estas homsimilaj
diablo-fantomoj.
***
La plej sankta afero
estas krei pacon,
prosperon
sur la tero.
***
Dio
estas Vivo ,
Paco kaj Amo
ĉio alia estas
stulta reklamo.
***
Tiuj, kiuj nome de Dio
parolas
ne diras tion,
kion Dio ja volas.
***
Ne prijuĝu homon
laŭ lia vestaĵo
troviĝas elegantaj homoj
al kiuj mankas saĝo.
***
La plej riĉa persono
estas homo donema
kvankam al ŝi
mankas mono.
***
La mondo
plenas je mizero
kaj problemoj
ne pro aĉuloj
sed pro silento
de bonegaj homoj.
***
Tie, kie regas mono,
libera estas
neniu persono.
***
Kie almozulo ĝuas
ĉiujn rajtojn
samkiel reĝo
tie estas la lando de
leĝo.
***
Ĉiuj egalas
antaŭ la leĝo
krom riĉuloj,
potenculoj
kaj lia moŝto Reĝo.
***
Inter fanatika malsaĝulo
kaj kruela sovaĝulo
la diferenco estas
Nulo.
***
Paradizo iam estis
la tuta tero

Homo transfirmis ĝin al
Infero.
***
Ne per glavo
sed per plumo
oni batalu
kontraŭ mallumo.
***
Kie ajn oni regas
per voĉdonado
kaj popola volo,
la registaro estas
reflekto de l' popolo.
***
Kaĝo ĉu ora
aŭ fera
estas ja kaĝo
tutvera!
***
Tie, kie senmerita persono
estas sur la trono
meritoplenaj personoj
estas en prizono.
***
la diferenco
inter bona kaj malbona
homaranoj
estas kiel diferenco
inter dezertoj kaj
oceanoj.
***
En ĉiu grandaĝa
homarano
vivas naiva
kaj bonkora
infano.
***
Grandanimaj pensuloj
vidas bonon
en malbonuloj,
sed etmensaj senpensuloj
serĉas malbonon
en bonuloj.
***
Ne gravas raso
nek haŭto,
sed gravas
bona konduto.
***
Tri Diojn adoras
la avara persono,
la unua estas
mono,
la dua estas
mono
la tria ankaŭ
mono!
***
Amo,
paco, amikeco
kaj prospero
estas mia religio
sur la tero.
***
Kie la plej multo
silentas kiel idiotoj,
tie baldaŭ regas
friponoj
kaj despotoj.
***
Religio
kiu nome de Dio
invitas al batalo
devenas de ne Dio
sed Diablo.
***
Idioto silenta
aspektas kiel
saĝulo prudenta.
***
kiu tute ne zorgas
pri vivo de l' homaro
kiel do diferencas
de l' fiŝo
en la maro?
***
Morti
kiel estimata leono
estas pli bone ol
vivi kiel senhonora
persono.
***
Trono kaj potenco
de ĉiopova Dio
estas en ĉies koro,
kaj tio ja ne estas
metaforo.
***
Homoj kiuj stulte
batalas
pro la Vero
finfine pace kuŝas
en la tero.
***
La kialo de l' vivo
estas ĝojo,
ja misgvida estas
Ĉiu alia vojo.
***
Homoj
kiuj ĝuas la vivon
surdorse de aliuloj
ne estas pli bonaj ol
sangosuĉaj kuloj.

Tiberio Madonna (Italujo)



La malvarmo
atingas
ĉiun angulon
en l’ aero
de la vintro.
La ĉielo griza

almozpetas
pri iu ajn koloro
kiun povas donaci
l’ aviadiloj.
La pintoj de l’ abioj
stimulas la ĉielon
ĝin pikante
kaj per reago
blankegaj floketoj
malpezaj kiel plumoj
faladas ĉirkaŭ nin.
Estas nia tasko
kapabli ilin preni.



Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Ekpluvegis, sed
Marto ekridetis kaj …
Neĝ’ ĉion kovris.



Sur la fenestro
pelargonio floras.
Ne zumas abeloj.



Grila koncerto
sur nokta pelerino.
Luna sonato.



Ĝemas la ŝalmo
ĉe la frua tagiĝo.
Velkas folioj.



Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKDUA

La ĉielo kaj la tero

§12-10

Zigong, post sia vojaĝo en la regno Chu en la sudo, revenis al la regno Jin. Kiam li pasis preter la suda bordo de la rivero Hanshui, li vidis, ke maljunulo laboras en sia legoma ĝardeno. El tunelo, kiu kondukis al la fundo de la puto, li alportis akvon per vazo por akvumi la legomojn. Li faris laboron penigan, sed la rezulto estis malgranda. Zigong diris al li:

“Troviĝas speco de maŝino, per kiu oni povas akvumi cent parcelojn en unu tago. Se vi ĝin uzos, vi ne devos labori tiel peze, sed la efiko estos multe pli bona. Ĉi vi volus havi unu?”

“Kia do ĝi estas?” demandis la legomĝardenisto levante la okulojn sur Zigong.

“La maŝino estas farita el ligno. Ĝi estas peza en la malantaŭo kaj malpeza en la antaŭo. Ĝi levas la akvon, kvazaŭ oni ĝin tirus, kaj la akvo elverŝiĝas tiel rapide, kiel la bolanta akvo superrandiĝos de kaldrono. Ĝi estas nomata putakvo-levilo.”

La ĝardenisto ŝanĝis sian vizaĝkoloron pro kolero kaj diris kun rikano:

“Mi lernis de mia instruisto, ke tiu, kiu uzas inĝenian maŝinon, devas fari inĝeniajn agojn, kaj ke tiu, kiu faras inĝeniajn agojn, devas havi inĝenian menson. Tiu, kiu havas inĝenian menson, certe ne plu posedas la purecon, nek la simplecon en la koro, kaj sekve perdas la trankvilon de la spirito, kaj tiu, kiu havas maltrankvilon en la spirito, ne atingos la Taŭon. Mi ne uzas la putakvo-levilon ne pro tio, ke mi ne

konas la avantaĝon de tiu maŝino, sed pro tio, ke mi hontus ĝin uzi.”

Hontigite, Zigong mallevis la kapon kaj respondis nenion.

Post iom da tempo la ĝardenisto demandis:

“Kiu vi estas?”

“Mi estas disĉiplo de Konfuceo.”

“Ĉu vi estas unu el tiuj,” diris la ĝardenisto, “kiuj volus rivali kun la saĝulo per siaj scioj, superi aliajn per fanfaronado kaj akiri al si reputacion en la mondo ludante kaj kantante solojn? Se vi nur forgesos vian spiritan menson kaj forĵetos vian fizikan formon, vi certe povos alproksimiĝi al la Taŭo! Nun ke vi ne povas regi eĉ vin mem, kiel do vi povus regi la mondon? Foriru de mi! Ne interrompu mian laboron!”

Pro honto ŝanĝiĝis la vizaĝkoloro de Zigong. Deprimita kaj embarasita, li marŝadis tridek liojn, antaŭ ol li revenis al sia antaŭa animstato.

Iu disĉiplo de Zigong demandis:

“Kio estas tiu homo? Kial vi perdis vian sinregadon pro li kaj reakiris ĝin nur post paso de unu tago?”

“Antaŭe mi pensis, ke mia instruisto Konfuceo estas la sola saĝulo en la mondo, kaj ne sciis, ke troviĝas ankaŭ tia maljuna homo. Mi lernis de mia instruisto, ke la saĝulo devas adapti siajn agojn al la cirkonstancoj kaj konduki siajn laborojn al la sukceso, atingante la plej bonajn rezultojn per la plej malgrandaj penoj. Kaj tamen la diroj de la maljunulo estas malsamaj ol la doktrino de mia majstro. Tiu, kiu alkroĉiĝas al la Taŭo, estas sendifekta en sia virto; tiu, kiu estas sendifekta en sia virto, estas sendifekta en sia korpo; tiu, kiu estas sendifekta en sia korpo, estas sendifekta en sia menso; kaj tiu, kiu estas sendifekta en sia menso, sekvas la vojon de la saĝulo. Li vivas inter la popolo ne sciante, al kia celo li iras. Kiel perfekta estas lia kompleta simpleco! Li forgesis sukceson kaj profiton, li forgesis artifikojn kaj ruzaĵojn. Tia homo ne iras tien, kien li ne volas iri, nek faras tion, kion li ne volas fari. Li restas indiferenta eĉ se ĉiu en la mondo laŭdas lin kaj aprobas, kion li faris. Li neniel ofendiĝas eĉ se ĉiu en la mondo kontraŭstaras al li kaj kondamnas, kion li faris. La laŭdo kaj la kondamno en la mondo lin ne profitigas, nek malprofitigas. Tia homo posedas perfektan virton, dum mi estas nur homo kun menso tiel influata de aliaj, kiel la ondoj moviĝantaj en la vento.”

Reveninte al la regno Lu, li rakontis sian aventuron al Konfuceo, kaj tiu diris:

“Tiu homo estas sekvanto kaj praktikanto de la doktrinoj de la majstro Ĥaoso. Li konas nur sian simplecon kaj nenion alian. Li scias kulturi nur internan memon kaj ne sian eksteran memon. Renkontiĝante kun tia homo, kiu, vere simpla kaj pura en la menso, jam revenis al sia denaska naturo sin tenante je la senagado kaj konservas sian naturan staton meze de la homoj de la mondo, kiel vi povus ne esti surprizita? Kiel do mi kaj vi povus kompreni la doktrinojn de la majstro Ĥaoso?”

§12-11

Sin direktante orienten al la vasta maro, Obskuro renkontiĝis sur la marbordo kun Venteto, kiu demandis:

“Kien vi iras?”

“Al la vasta maro,” respondis Obskuro.

“Kial?” demandis Venteto.

“La vasta maro,” diris Obskuro, “estas la loko, kiun oni neniel plenigas per enverŝo de akvo, nek malplenigas per ĉerpado. Mi iras tien por turisma vojaĝo.”

“Majstro,” diris Venteto, “kvankam vi ne interesiĝas pri la estaĵoj kun horizontalaj okuloj (la homoj) , mi volus, ke vi diru al mi ion pri la regado de la saĝulo.”

“La regado de la saĝulo,” respondis Obskuro, “konsistas en la jeno: loki siajn regnoficistojn en konvenaj postenoj, promocii siajn regnoficistojn laŭ iliaj talentoj, fari konscience esploradon antaŭ ol li entreprenas ion, paroli kaj agi konforme al la principo de la natura evoluo de la estaĵoj. Se tiel estas, la tuta mondo pliboniĝas per si mem. Sufiĉas, ke li nur svingas sian manon aŭ movas siajn okulojn, kaj la popolo de ĉiuj direktoj venos kaj obeos al li. Tio estas nomata ‘la regado de la saĝulo’.”

“Mi volus, ke vi diru al mi ion pri la virtulo,” demandis Venteto.

“La virtulo,” respondis Obskuro, “pensas pri

nenio restante hejme kaj konsideras nenion marŝante ekstere. Li donas nenian atenton al la ĝusteco kaj malĝusteco, bono kaj malbono. Profitigi la mondon estas por li ĝojo, kaj satigi la deziron de la mondo estas por li kontento. Li aspektas tiel afliktita, kiel infano perdinta sian patrinon, kaj tiel necerta, kiel vojaĝanto perdinta sian vojon. Li havas superabundon da riĉaĵoj kaj nutraĵoj, sed li ne scias, de kie ili venas. Jen kia estas la virtulo."

"Ĉu do vi volus diri ion pri la homo kun la spirito supernatura?" demandis Venteto.

"Tia homo," respondis Obskuro, "rajdas sur la lumo kaj malaperas en la lumo kune kun la formoj de ĉiuj estaĵoj. Tio estas nomata la 'universala prilumiteco'. Kiam lia vivo kaj liaj naturaj dispozicioj venas al sia fino, li ĝuas plenan ĝojon kun la ĉielo kaj la tero kaj malaperas kun ĉio en la mondo. Kiam ĉio en la mondo revenas al sia vera naturo, tio estas nomata 'ĥaosa mallumo'."

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Balai la korton

el la rakontoj pri Afanti
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Afanti
jen kiel junul'
penlaboris tagnokte
por vilaĝa bienul'
kiel stulta mul'.

Laŭ regul'
la mastro al li
devas pagi salajron
je jarfino sen vari'
kaj ajna menci'.

Nun
venis la tago
lasta de la jaro jam,
la mastro per fi-ago
volis je l' pago

senigi
lin ruzoplene.
Al Afanti ordonis
li balai zorgeme
la korton pene.

Li diris:
"Balau pure
ĝin sen akvoverŝo, sed
ĝi malsekas plezure
kaj brile pure."

Afanti
obeiis jen
kaj ekbalais korton.
Li pensis, kiel, kun pen',
ja purigi sen

akvoverŝ'
korton espere,
sed kun malseka grundo.
Do, li elprenis vere
zorg-maniere

la tutan
stokon da ole'
de l' mastro kaj aspergis
ĝin sur la teron ĉie
glate, glite tre.

Post tio
li ĉe koridor'
sidiĝis kaj atendis,
ke la mastron pro l' labor'

laŭdos per honor'.

Revenis
la mastro ĝoje
sed kiam li rigardis
la teron fojrefoje,
li kriis boje:

"Ho, Alah'!
Redonu al mi
oleon, ho, oleon!
Mi ne salajron al vi
donos, al vi fi!"

Afanti
diris kviete:
"Ĉion mi faris bone
laŭ ordono diskrete
kaj belrimede.

Bonvole
pagu salajron
al mi laŭ interkonsent'.
Ne ludu kolerfajron
nek ja kanajlon."

La mastro
nenion tute
diris, al Afanti
pagis salajron mute
kaj sendispute.



Eto (Ĉinujo)

Mi estas rojo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Glugle
fluas leĝere
mi senĉese antaŭen
spite ŝton-baron vere,
kuras libere.

Mi plenas
ĉiam de memfid'
sen tim' al tera distord'.
Sturmas per forta senbrid'
mi kun ĝoja rid'.

Mi restas
juste firmvola
kontraŭ cunam' kaj ŝtormo
kontraŭ granit' malmola,
jes, mi ja sola.

Mi fluas
al monta valo
kovrita per verdaĵoj
inter leviĝ' kaj falo
en akv-kristalo.

Mi ŝatas
verdon de l' natur',
belaj floroj disfloras
tie kaj alie sur
ĝi kun vid-plezur'.

Mi fluas
al la kamparo
por akvumi plantaĵojn,
nutri per akv-nektaro
jaron post jaro.

Mi fluas
al la urbeto
por beligi l' medion,
trinkigi homojn en preto
sen flu-impeto.

Mi fluas
al stepo vasta
por ĉirkaŭpreni herbojn
junajn kun kresko hasta

sur grundo ĉasta.

La tero
vasta senlime
estas ja hejmo mia.
Sentas mi min proksime
al ĝi intime.

Ne povas
mi disde la ter'
min apartigas vere,
mi ĝin amas kun sincer'
per ajna ofer'.

Yanke (Ĉinujo)

La plej bela sezono

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Folioj
iom post iome
flaviĝas ĉe aŭtunfin'
kaj ekfalas malzome
kaj pejzaĝ-done.

Orflavaj
flokoj en aer'
flirtadas papilie
vent-rajde en liber'
sible kun leĝer'.

La tero
kovriĝas plene
per folioj en orflav'
ne mortintaj ĉagrene
sed vivaj bene.

Sur river'
flosas laŭflue
oraj veletoj belaj,
ja cedemaj senbrue
kaj vetur-ĝue.

Folioj
de flava kolor'
pavimas la teron per
bela natura trezor'
brila kiel or'.

ha, kiel
bela la mondo!
La panoram' aŭtuna
de rivero ĝis monto
belas en blondo.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarangĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Irina Pantelejeva

Rusa-franca konfuzo

– Mi estos en Moskvo marde. Renkontu!

Voĉo de Nina, la tia seksema, kun sudrusa prononco elsaltis el aŭskultilo, poste flugis telefonaj sirenoj kaj rememoroj el infanaĝo.

Renkontiĝinte en halo de flughaveno Ŝeremetjevo-2 kuzinoj eniris en ŝvitan taksion kaj veturis al Moskvo. Nina estas pompmama kaj blankhaŭta kvardekkvinjaraĝa blondulino. Katarina estas kvardekkvarjaraĝa, maldika kaj lacigita per klopodoj, gepatroj forveturigis ŝin en infanaĝo el provinco al Moskvo.

Ili eniris en kafejon por interparoli.

– Mi serĉas edzon, – Nina diris. – Jen mi venis renkonti kun unu franco. Sinjoro Bernar estas lia nomo. Ni konatiĝis en Interreto kaj dum tuta jaro korespondis en retejo de konatiĝoj. Li pagis vojaĝon tien kaj reen. Je la kvina ni renkontiĝos en gastejo "Ukrainio". Tie li luis ĉambron por du homoj.

– Nu vi estas kuraĝa! Kiel vi decidis veturi al nekonata homo? – Katarina kun dubo pririgardis kuzinon. – Ĉu subite li ne venos?

– Li venos! Nepre! Mi sendis al li tiajn fotojn! Nu certe tiuj fotoj estis pikantaj. Mi skribis, ke mi povas kuiri, kuiri barĉon. Kaj li

skribis, ke li bezonas tian edzinon!

– Nina, – Katarina kaprice diris, – ĉu vi permesos al mi veni kun vi? Mi tre volas ekvidi fremdlandanon. Kiam ankoraŭ tia ebleco aperos?

– Bone. Ni venu! – hipokrite ekspiris Nina sekrete ĝuante pro sia stato de fianĉino de fremdlanda fianĉo. – Vi nur ne restu kaj foriru pli rapide.

Kuzinoj per taksio atingis gastejon, kie sinjoro Bernar, nealta dika franco, jam atendis sian fianĉinon en vestiblo. Nina per malbona angla lingvo prezentis kuzinon, kiu kun malsaĝa rideto de plena idiotino donis al franco manon por kiso.

– Ve, – Katarina diris ne ŝanĝante mienon. – Panjo parolis: “Lernu francan lingvon!” Sed mi scias nur unu frazon: “Mosje, ĵe ne manĵ pa sis ĵur”[1].

Sinjoro Bernar levis brovojn, mirigite rigardis al Nina kaj demandis:

– Porkua?[2]

– Nu Katarina, vi estas stultulino! – Nina diris kun ĉarma rideto. – Ĉu vi scias, kion vi ĵus diris? Vi diris, ke ne manĝis dum ses tagoj!

– Ĉu efektive?

– Jes, stultulino. Li demandis vin: “Kial?” Foriru, li povas pensi, ke mi volas nutri ĉiujn miajn parencojn je la konto de li!

Katarina per flanko iris al elirejo sendinte al franco aeran kison. Sinjoro Bernar galante akompanis Ninan al ĉambro kun vidaĵo al prospekto. Dislokinte aĵojn kun helpo de disciplinigita pordisto kaj admirinte vidaĵon tra fenestro ili malleviĝis en restoracion, por ke mallongigu minutojn de ĝeno, kiuj estas neeviteblaj en unua renkontiĝo.

Poste Nina ne komprenis, kial oni konsideras francojn kiel plej bonajn amorantojn. Sed tio estis ne grave.

– Nu kia estas li en lito? – Katarina demandis, kiam Nina matene telefonis.

– Mi konsterniĝis! Ja vi scias: francoj estas plej bonaj amorantoj, – Nina respondis. – Antaŭe mi sentis nenion similan!



Ilustraĵo de Igorj Ĥomjakov

– Ĉu vi tamen venos al ni? Paŭlo ĝojos!

– Ne! Mi ne volas, por ke mia Bernar ekvidu vian teruran loĝejon! Kaj via Paŭlo estas sobra nur matene dum matenmanĝo. “Jen, – Bernar diros al mi, – kiajn parencojn vi havas!”

– Nu jes, – Katarina malvigla respondis. – Mi komprenas.

Nina fiere kaj senĝene paŝis kun sinjoro Bernar laŭ strato Arbat[3] kaj prenis de li donacojn kun degna rideto. Ŝi preskaŭ sentis sin kiel sinjorinon Bernar kaj penis konformiĝi per tutaj fortoj. Sinjoro Bernar miris pro diverseco de varoj kaj haltis apud ĉiu vendotablo por provi felajn ĉapojn aŭ militajn kaskojn de tempo de civita milito en Rusio en komenco de dudeka jarcento.

– Ĉu *vagino* estas? – demandis ebria juna homo kaj nemulte forŝovis sinjoron Bernar de vendotablo de muzikaj diskoj.

Vendistino, ruĝvanga junulino, nemulte enpensiĝis kaj respondis:

– Erotikaj revuoj estas en najbara vendotablo.

– Ĉu disko de bando “*Vagono*” estas? – klare diris juna homo.

Nina ekridis, vendistino etridis, juna homo singultis kaj iris for.

Sinjoro Bernar levis brovojn:

– What is it?[4]

Nina konsterniĝis kaj ne respondis. “Jes, – ŝi pensis, – mi urĝe devas lerni francan lingvon. Estas interese, kiel en franca lingvo estas *vagino*?”

Ili pasigis nokton kiel la antaŭan. Matene ili decidis viziti Templon de Kristo-Savinto. Tio estis ilia lasta tago en Moskvo, ili volis viziti ion konsiderindan. Vespere ili devos forflugi: ŝi devos forflugi al urbo Krasnodar[5], li devos forflugi al Parizo. Sinjoro Bernar kaj Nina pompe leviĝis laŭ ŝtuparo de Templo, sed subite franco ektremis, haltis kaj paliĝis. Per gestoj li klarigis al Nina, por ke ŝi iru sole, sed li atendos ŝin ĉi tie.

Akompaninte Ninan per vaga rigardo sinjoro Bernar kun frenezaj okuloj forkuregis de Templo de Kristo-Savinto. Li ne komprenis, kien li kuregis, sed daŭrigis kuri laŭ strato Ostoĵenka sovaĝe kaj nervoze ĉirkaŭrigardante al flankoj.

“Kia estas konfuzo! – li pensis en pura franca lingvo. – Bedaŭrinde tiel okazis! Tio okazis pro rusa barĉo! Kion ŝi pensos?”

Trakurinte kvincent metrojn kaj fine senfortiĝinte sinjoro Bernar enkuris en ian kafejon kaj malaperis en ĉambreto kun desegnaĵo de vira silueto.

Nina rapide starigis kandelojn, pririgardis kelkajn ikonojn, revenis en tiu loko, kie antaŭ dek minutoj lasis sinjoron Bernar. Sinjoro Bernar ne estis. Nina ĵetis sin tien kaj ĉi tien, ne trovis sian kuniranton kaj haltis. Ŝi decidis atendi kaj ne maltrankviliĝi, kvankam tute ne povis kompreni, kien malaperis sinjoro Bernar.

Nina staris sur tiu loko ankoraŭ dum duonhoro en embaraso kaj ekscitiĝo. Ŝi tremis jen pro varmego jen pro malvarmo. Ŝi konsterniĝis kaj ekzekutis sin per konjektoj: kion ŝi ne komprenis? Ĉu verŝajne sinjoro Bernar parolis ion per gestoj, sed ŝi ne komprenis?

Ĝis forflugo restis kvin horoj, aĵoj kaj dokumentoj estis en gastejo, ŝi devis entrepreni ion kaj tuj.

En gastejo, kien Nina alveturis per metroo, sinjoro Bernard ankaŭ ne estis.

“Jen li estas serpento!” – pensis Nina malbenante ĉion en mondo.

Nina pene persvadis pordiston doni al ŝi ŝlosilon de ĉambro kaj preninte aĵojn apenaŭ sukcesis al forflugo. Ŝi ne komprenis ekstravagancon de franco. Impreso estis fine difektita, kaj Nina kun maldolĉeco pensis, ke nun ŝi neniel povos iĝi sinjorino Bernar.

– Nu kiam estos geedziĝa festo? –Katarina demandis telefoninte al Nina.

– Franco ektimis ĝis lakso. Geedziĝa festo ne estos, – Nina respondis kaj metis aŭskultilon.

notoj:

1. *“Mosje, ĵe ne manĵ pa sis ĵur” (frazo en difektita franca lingvo) – “Sinjoroj, mi ne manĝis dum ses tagoj”. Tio estas citaĵo el fama romano “Dek du seĝoj” de famaj sovetiaj verkistoj Ilf kaj Petrov.*
2. *Porkua? (france) – Kial?*
3. *Strato Arbat – fama piedira strato en Moskvo, en kiu estas multaj memoraĵaj vendotabloj, butikoj kaj vendejoj.*
4. *What is it? (angle) – Kio estas ĝi?*
5. *Krasnodar – granda urbo en sudo de Rusio.*

Esperantigis

Igorj Ĥomjakov

(Rusujo)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,
Chongqing, 400023, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Retadreso: vejdo@163.com
Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_